8-a Jaro
N-ro 5 (41).

Februaro 1934.
*Aperas dumonate.*

# LA JUNA BATALANTO

Organo de la Internacia
Katolika Junulara kaj Paca Movado

ELDONATA DE

MONDJUNULARO KATOLIKA, MOKA

Redaktoro : D-ro WILHELM SOLZBACHER.

ENHAVO :

**Ordo kaj Paco en la Mondo** (de Dante Alighieri). — **La Katolika Junulara Paca Movado en Flandrujo kaj Nederlando** (de A. Mady). — **Ni ne forgesas ilin** (de J. B.). — **St. Louis, Du vizitoj** (de Wilhelm Solzbacher). — **Jesuo en ĥina malliberejo** (de Pastro Raymond Lei). — **AD LUCEM** (kun bildo). — **Internacia Junulara Agado** (Katolika Junularo. — Internacia Konkurso por la Junularo. — Junularaj renkontoj ĉiuspecaj. — Studenta Junularo. — Protestanta Junularo. — Socialista Junularo. — Komunista Junularo. — Pacifista Junularo). — **Nia Movado.** — **Familiaj Informoj.** — **Kolekto por Plifortigi LA JUNAN BATALANTON.** — **Leterkesto.**

REDAKCIO : **77, Montée de Pilate, Luxembourg-Eich.**

Eldonejo : ELDONA KOOPERATIVO LA JUNA BATALANTO,
77, Montée de Pilate, 77, Luxembourg-Eich, Luksemburgo.

Presejo: Imp. DISONAISE, J. Winandy, Dison. (Belgujo)

# Abonprezoj de “ La Juna Batalanto „

Normala abonprezo : jare 2 germanaj markoj, kun MOKA-membreco 3 M. La eldonejo akceptas monbiletojn, ĉekojn, poŝtmandatojn, respondkuponojn, aŭstrajn, belgajn, francajn, germanajn, luksemburgajn poŝtmarkojn.

| Lando | jara abono | kun MOKA-kotizo | simpla kotizo | Lando | jara abono | kun MOKA-kotizo | simpla kotizo |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Anglujo | 3 s | 4 s | 1 s 3 d | Hungarujo | 3 p | 4 p | 2 p |
| Argentino | 1,50 p | 2 p | 1 p. | Italujo | 9 l | 14 l | 5 l |
| Azio | 3 s | 4 s | 1 s 3 d | Japanujo | 3 s | 4 s | 1 s 3 d |
| Aŭstralio | 3 s | 4 s | 1 s 3 d | Jugoslavujo | 30 din. | 40 d | 15 d |
| Aŭstrujo | 3,40 s | 5 s | 2 s | Litovujo | 5 lit. | 7 l | 3 l |
| Belgujo | 3,50 b | 6 b | 2 b | Luksemburgo | 18 fr | 25 fr | 10 fr |
| Brazilio | 4 mr | 5 mr | 2 mr | Meksiko | 0,50 dol | 0,75 d | 0,30 d |
| Ĉeĥoslov. | 16 kr | 20 kr | 10 kr | Nederlando | 1,25 fl | 2 fl | 0,80 fl |
| Danujo | 2 kr | 3 kr | 1 kr | Polujo | 4zl | 6 zl | 3 zl |
| Danzig | 2 g | 3 g | 1,20 g | Portugalo | 8 esc | 12 e | 5 esc |
| Francujo | 12 fr | 18 fr | 6 fr | Rumanujo | 80 lei | 100 l | 40 lei |
| Germanujo | 2 M | 3 M | 1,20 M | Svedujo | 2 kr | 3 kr | 1 kr |
| Grekujo | 38 dr | 50 | 15 dr | Svisujo | 2,50 fr | 4 fr | 1,50 fr |
| Hispanujo | 5 p | 8 p | 2 p | Usono | 1.00 dol | 1.50 dol | 0,50 dol |

Ni akceptas ankaŭ pagojn por duona jaro aŭ kelkaj jaroj. Membroj de MOKA ricevos ankaŭ aliajn publikigaĵojn. Donacoj por la subtena kaso (liverado de J. B. al malriĉuloj) estas invitataj.

*Abonejoj* : Krom al la eldonejo oni povas ankaŭ pagi al la naciaj sekretarioj de MOKA.

*Poŝtkontoj*. Germanujo : Köln 480 37 (Dr Wilh. Solzbacher. Köln-Dellbrück); Francujo : Strasbourg 8180 (P. I. A. Muffang, Bourg-la-Reine); Aŭstrujo : Wien A 134.593 (Katolika Unuiĝo Esperantista en Wien); Svisujo : Luzern VII. 2030 (Schweiz. Kath. Jungmannschaftsverband, Zug); Belgujo : 3313.51 (Jean Winandy, Dison).

*Ĉeĥoslovakujo* : 15.132 (Ustredie slovenskych katolickych skautov pre Slovensko, Bratislava.

## AĈETU KAJ DISVASTIGU NIAJN PROPAGANDFOLIOJN KAJ BROŜUROJN!

**Mondjunularo Katolika,** kvarpaĝa informilo pri celo, historio, organizo kaj agado de MOKA (en Esperanto), 10 ekz. 0.25 RM, 50 ekz. 1.— RM.

**Les Œuvres Internationales de Jeunesse Catholique** , 40-paĝa broŝuro en franca lingvo, 2 fr. fr. (0.35 RM.).

**La Jeunesse Mondiale Catholique,** kvarpaĝa varbilo en franca lingvo 10 ekz. 1 fr. fr. (0.20 RM), 50 ekz. 4.— fr. fr. (0,70 RM).

**Dans 60 pays,** dupaĝa varbilo en franca lingvo, 25 ekz. 1.50 fr. fr. (0.25 RM).

**Towards an International Catholic Youth and Peace Movement,** kvarpaĝa varbilo en angla lingvo. 10 ekz. 5 d, 8 c (0.25 RM), 50 ekz. s 1/6, dol. 0.25 (1.— RM).

**Die katholische Jugend lernt Esperanto.** Kvarpaĝa varbilo por Esperanto (en germana lingvo). 50 ekz. 0.80 RM, 100 ekz. 1.50 RM.

**Die Katholische Weltjugendliga.** Moderna informa broŝuro pri MOKA en germana lingvo, aperinta 1932, 12 paĝa. 0.15 RM, 5 ekz. 0.50 RM.

**Die Katholische Weltjugendliga.** 16 paĝa broŝuro aperinta 1919. Plej bona informilo pri la historio de nia movado. 0.10 RM.

**Wir Katholiken und die internationale Jugendbewegung.** Von Hanns Sappl. 48 paĝa broŝuro aperinta 1921 kun antaŭparolo de episkopo Majlâth, protektoro de MOKA. Grava por ĉiu, kiu deziras ekkoni la originojn de la MOKA-movado. 0.20 RM.

**Eldonejo LA JUNA BATALANTO, 77, Montée de Pilate, 77, Luxembourg-Eich, Luksemburgo.**



# Ordo kaj paco en la mondo.

La radiko kaj fundamento de la Imperia Majesto estas la bezono de la homa civilizo, kiu direktiĝas al unu celo, nome al feliĉa vivado; al kiu neniu povas veni sola sen la helpo de iu alia, ĉar ja la homo bezonas multajn aferojn, kiujn li sola ne povas havigi al si. Kaj same kiel individua homo bezonas por si la doman komunecon de familio, tiel domo bezonas najbarojn, alie multaj mankoj estiĝus, kiuj malhelpus la feliĉecon. Kaj ĉar najbararo ne povas en ĉio sufiĉi al si mem, por plenumi ĉiujn bezonojn, estas necese, ke ekzistu urbo. Kaj urbo por sia ekonomio kaj defendo serĉas interrilatojn kaj fratecon kun najbaraj urboj, kaj pro tiu kaŭzo reĝolandoj estiĝis. Kaj tial ke la homa spirito ne kontentiĝas pri donita posedo de tero, sed ĉiam deziras gajni pli multe, kiel ni vidas per sperto, malkonkordo kaj militoj estiĝas inter lando kaj lando. Tio estas la mizero de la urboj; kaj per la urboj de la najbararoj; kaj per la najbararoj de la familioj; kaj per la familioj de la homo; kaj tiel malhelpiĝas la feliĉo. Tial, por forigi la militojn kaj iliajn kaŭzojn, estas necese ke la tuta tero kaj ĉio, kio estas donita al la homa raso, estu Monarkio, tio estas unu sola ŝtato kun unu princo, kiu, posedante ĉion kaj ne povante atingi pli, tenu pacon inter ili, tiel ke estu trankvilaj la urboj, en kiu trankvileco la najbararoj amos unu la alian, en kiu amo la familioj plenumas siajn bezonojn, tiel ke la homo vivos feliĉe; kio estas la celo, por kiu li estas naskita.

DANTE ALIGHIERI.

(Il Convivio, Trattato IV. 4).

# La Katolika Junulara Paca Movado en Flandrujo kaj Nederlando

En Flandrujo, same kiel en ĉiuj aliaj landoj, depost la milito de 1914-1918 estiĝis tre forta kontraŭmilita spirito, des pli facile, ĉar la flandro estas nature antimilitarista. La entuziasmo por la armeo estis ĉiam tre malgranda inter la katolikoj de nia lando : antaŭ la milito estis ĉiam la katolikoj, kiuj faris en la parlamento la plej multajn malfacilaĵojn kontraŭ ĉiu pligrandigo de la armeo kaj de la armeelspezoj.

Malgraŭ ĉi tiu tre pacifista sentado la katolika Flandrujo konis post la milito eĉ ne unu pure pacifistan organizaĵon. Katolikoj, kiuj sentis la bezonon de organizaĵo kontraŭ la ripeto de la lasta abomena militdramo, estis devigataj aliĝi al religie neŭtrala unuiĝo : al la Vlaamsche Jongeren Vredes-Actie (Flandra Junulara Paca Agado). Tiu « neŭtrala » karaktero estis kaŭzo aŭ almenaŭ okazo por kelkaj pastroj, malrekomendi al la junularo aliĝon al tiu movado. Pro tiuj kaŭzoj kaj en la konvinko, ke ilia movado estos pli forta, se ĝia bazo estas pure katolika, kelkaj katolikaj junuloj decidis en la jaro 1931 fondi katolikan unuiĝon sub la nomo Katholieke Jongeren Vredes-Actie (Katolika Junulara Paca Agado) kaj eldoni monatan organon nomatan « Vredes-Actie ». Tiu grupiĝo ne okazis sen multe da peno kaj oferoj financaj kaj aliaj. Kvankam ĉiam la katolika doktrino estis la bazo de la unuiĝo kaj kvankam rilate la militon la instruo laŭ Sankta Tomaso kaj la papaj dokumentoj servis kiel direktivoj, la Katolika Junulara Paca Agado neniel povis ĝoji pri iel grava (almenaŭ publika) kunlaboro de la pastraj gvidantoj de nia popolo. Male, kiom ajn miriga tio povas ŝajni, la unuiĝo suferis multe pro malkonfido kaj eĉ kontraŭbatalado.

La gvidanta flandra gazetaro katolika sisteme silentis pri la movado. Konvinkitaj katolikaj pacifistoj aliflanke pensis ne devi aliĝi, ĉar ĝuste la klare katolika karaktero ŝajnis al ili grava malhelpo : En Flandrujo ĉiam iu katolika grupo ne pure religia, kiu ne apartenas al la politika katolika ŝtatpartio, estas rigardata kun granda malkonfido kaj estas bedaŭrinde kelkfoje kontraŭbatalata el pure religia vidpunkto. Aldonu ankoraŭ la malfacilaĵojn, kiuj estiĝas el la fakto, ke ĉiuj, kiuj publike ariĝas ĉirkaŭ la radikale pacifista standardo, estas minacataj per perdo de sia pano...

Kaj tamen — malgraŭ ĉiuj ĉi malfacilaĵoj la Katolika Junulara Paca Agado povis fondi en unu jaro 15 grupojn kun ducento da membroj kaj ĝia organo « Vredes-Actie » varbis 2.000 abonantojn.

La Katolika Junulara Paca Agado (K. J. V. A.) volas unuigi, sen diferenco pri politikaj opinioj, ĉiujn katolikojn nederlandlingvajn, kiuj serioze volas la pacon kaj ribelas kontraŭ ĉiu armado kaj ĉiu milito. (Kelkaj katolikaj holandanoj, kiuj ne trovis kontentiĝon en la modera programo de la Romkatolika Paca Ligo en Nederlando, aliĝis ankaŭ al la K. J. V. A.) Kiel ni jam diris, la katolika doktrino estas la bazo de ĝia pacmovado, kaj en la batalo kontraŭ milito kaj militpreparado ĝi sekvas la tomistan instruon kaj la papajn dokumentojn. Por la katolikaj junuloj la milito ne estas principe malbona per si mem, sed ili ne akceptas en la hodiaŭaj cirkonstancoj la eblecon de justa milito. La milito de 1914-1918 montris tro klare la neniigan karakteron de la moderna milito. La naturo de la venonta milito estas tro evidenta. Ĉar la junularo scias, ke la venonta milito devas fariĝi simpla buĉado de milionoj da pacemaj homoj, virinoj kaj infanoj kiel da soldatoj, ĉar ni konas la financan ekspluatadon antaŭ la milito okaze de la ĉiama sensenca plialtigo de la armebudĝetoj kaj la ankoraŭ pli grandan ekspluatadon en la milito mem, ĉar ni scias, kiom facile maljusta socia revolucio estiĝas en la nesana militatmosfero, ĉar ni fine estas konvinkitaj, ke el la milito ne estiĝas la justeco, sed nur pliriĉiĝo de kelkaj financuloj kaj profito por tiuj, kiuj ŝatas fiŝkapti en malklara akvo, ĉar ni scias ĉion ĉi, ni volas tute decide rifuzi, subteni la ripetadon de tia peka afero.

Celo de la K. J. V. A. do ankaŭ estas : doni esprimon al la serioza packonfeso kaj al la batalo kontraŭ ĉia milito kaj armado; per serioza studado sub gvido de kompetentuloj serĉi la kaŭzojn de la milito kaj la ilojn, por ilin forigi, kaj agi kuraĝe kaj sentime laŭ la konkludoj de tiu studo; fervore labori por detrui la malkonfidon inter la nacioj, por ke, precipe inter la katolikoj, regu internacia spirito de vera frateco foriganta ĉiun troigitan kaj mallarĝvidan naciismon; fine helpi prepari novan mondordon subtenitan per internacia tribunalo kaj vera Ligo de Nacioj, kies decidoj kaŭzas la samajn devigojn kiel leĝo en iu lando kaj kiu sola rajtas posedi polican potencon, por realigi la decidojn de la Supera Tribunalo kaj por malhelpi kaj puni kontraŭagantojn.

Ni bone scias, ke tiu celo estas granda; tamen ni ne lasas ĝeni nin per la moko de tiuj, kiuj konsideras nin kiel purajn idealistojn ne konantajn la realecon. Ni ĉiam apogas nin sur la plej altan eklezian juĝon, kiu jam kondamnis la lastan militon kiel fratmortigon kaj predikas pacon kaj malarmadon en oportunaj kaj maloportunaj tempoj. Politikistoj kaj ekleziaj altranguloj jam montris la sensencan kaj idolanan karakteron de la devizo « Kiu volas la pacon, preparu la militon! »; kaj tial ni volas malgraŭ ĉio kaj malgraŭ ĉiuj la kristanan devizon « kiu volas la pacon, preparu la pacon! », tial ni volas la papan parolon « Pax Christi in Regno Christi ».

Kiu helpas kaj preĝas kun ni, kiu laboras kaj batalas kun ni, por ke inter la popoloj regu la kristana spirito de konfido kaj fratamo, la vera paco?

A. MADY.

P. S. — La organo « Vredesactie » aperas monate en nederlanda lingvo kaj kostas eksterlande 3 belgojn. Adreso por abonoj : Kam. Lernout, Vrouwstraat 3, GELUWE, Belgujo. La K. J. V. A. ankaŭ eldonis glumarkojn en nederlanda lingvo kaj Esperanto : « Luktu por mondpaco! ».



# Ni ne forgesas ilin.

Ni pensas je niaj fratoj el la katolika junularo, kiuj estas persekutataj kaj malbone traktataj pro siaj konvinkoj. Ni pensas je tiuj, kiuj suferas en la malliberejoj de diversaj landoj, kaj ne forgesas ilin. Ilia ofero ne estu vana. Ni kredas, ke estas nia devo, almenaŭ en mallonga kroniko paroli pri tiuj kazoj, pri kiuj ni informiĝis en la lasta tempo. Eble kelkaj el tiuj junaj katolikoj faris erarojn kaj malprudentaĵojn. Sed ni estas konvinkitaj, ke estis granda maljustaĵo, enkarcerigi ilin pro ilia aktiveco en la katolika junularo aŭ en katolikaj movadoj.

El *Meksiko* venas la sciigo, ke *Armando Chavez Camacho*, redaktoro de la bulteno de la Ibero-Amerikana Sekretariejo de Katolikaj Studentoj, estas kondamnita je du jaroj da malliberejo pro striko, kiun li organizis en la universitato. Li estis unu el la pioniroj de kunlaboro inter la katolikaj studentaj ligoj de Suda kaj Centra Ameriko kaj lerte redaktis la bultenon. Okaze de la Pax Romana-Kongreso en Luxembourg oni unuanime elektis lin vicprezidanto de la Internacia Unuiĝo de Katolikaj Universitataj Ĵurnalistoj. Li iras en malliberejon, ĉar li kuraĝe batalis kontraŭ la kontraŭreligia tendenco oficialigita en la universitato de Meksiko.

En *Rusujo* la agado de la sendiuloj ne ĉesas, kaj ankoraŭ multaj katolikaj pastroj troviĝas en malliberejoj aŭ en ekzilo ie en Siberio.

El *Italujo* ni aŭdas pri la proceso kontraŭ la « neo-guelfi » antaŭ la speciala tribunalo de Milano. La 30 januaro 1934 Gioachino Malavasi kaj Pietro Malvestiti estas kondamnitaj je 5 jaroj, Armando Rodolfi je 3 jaroj, Oliviero Ortodossi je 2 jaroj da malliberejo pro « kontraŭnacia propagando ». Ili estis fondintaj sekretan grupon kun katolikaj-demokrataj celoj kaj eldonis diversajn broŝurojn. En ilia manifesto ili publikigis kiel devizo vortojn de Kardinalo Mercier kontraŭ la « tiranaj registaroj », la sociala programo sekvis la instruojn de la papaj encikliko), la politika programo la celojn de la dissolvita Katolika Popola Partio.

La katolikoj de la tuta mondo nun rigardas kun speciala zorgo al *Germanujo*, kie la katolika junularo pene defendas sian ekziston. Malgraŭ la konkordato preskaŭ ĉie la katolikaj junularaj grupoj estas sisteme ĉikanataj. Oni malpermesis al iliaj membroj, porti uniformojn kaj insignojn, fari publikajn kunvenojn, marŝi sur la stratoj, publikigi klarigojn en la gazetaro. Eĉ en unu kazo (Köln) oni malpermesis al la ligo Nova Germanujo (kiu estas kvazaŭ skolta asocio) ĉiujn aranĝojn en libera aero. Membroj de katolikaj ligoj estas ĉie rigardataj kiel duaklasaj homoj rilate al la Hitler-Junularo, kiu, malrespektante la solenajn garantiojn en la konkordato, pretendas esti la sola junulara movado. La katolikaj studentaj asocioj C. V. kaj K. B. (en kiu la antaŭaj K. V. kaj R. K. D. B. unuiĝis) forigis la « konfesan principon ». Ilia bazo, kiu ĝis nun estis la katolikismo, estonte do estos la nacisocialismo. Prave multaj membroj pro tio eksiĝis. Neniu semajno pasas, en kiu ne kelkaj pastroj estas arestataj. Ni povus doni longan liston da nomoj, inter kiuj niaj gelegantoj trovus kelkajn konatajn. Oni devigas la katolikajn ĵurnalojn, publikigi la atakojn kontraŭ la katolika junularo, defendan respondon neniu povas riski publikigi. Oni eĉ devigis la bavarajn katolikajn ĵurnalojn, publikigi la atakojn de la ministro Esser kontraŭ Kardinalo Faulhaber. En la nokto post tiu atako de la ministro du pafoj kontraŭ la domo de la Kardinalo feliĉe restis sensukcesaj. La krimuloj, kiuj faris tiun atencon, ĝis nun restis nekonataj...

En *Jugoslavujo* la situacio restas malfacila por la katolika junularo. Kelkaj katolikaj ligoj, precipe la « Orel », ankoraŭ estas dissolvitaj. La korpa edukado estas la monopolo de la « neŭtrala » Sokol, kies membroj ĉie ĝuas specialajn privilegiojn oficialajn. Unu el niaj plej simpatiaj kunlaborantoj, kiu estis gvidanto en kroata katolika junulara ligo kaj kiu cetere ankaŭ jam estis estinta en malliberejo, devis jam antaŭ pli longa tempo forlasi la landon...

El *Litovujo* kaj *Hispanujo* ni ankaŭ povus doni malĝojajn ekzemplojn. Malgraŭ ĉio — vivu la katolika junularo de ĉiuj landoj! Kaj vivu la estonta Katolika Junulara Internacio!

J. B.

# St. Louis, Du vizitoj.

I.

En Chicago, okaze de tagmanĝo por eksstudentoj de la Loyola-Universitato, mi konatiĝis kun P. Daniel Lord S. J., kaj en la parolado, kiun li tie faris, mi tuj havis okazon, admiri la brilajn kvalitojn, kiuj faris lin la plej sukcesa katolika junulargvidanto en Usono. Mi ja estis antaŭe aŭdinta pri li kaj vidinta lian gazeton « The Queen's Work », tamen mi estis mirigata pri la vigla, energia, bonhumora, sprita, apostola personeco de la potenca reviviginto de la Marianaj Kongregacioj (Sodality of the Holy Virgin) en Ameriko. Li tutkore invitis min, viziti la centrejon de la movado en St. Louis (ŝtato Missouri). Mi tre bedaŭris, ke tiu urbo estis iomete (t. e. ĉ. 500 kilometrojn) malproksima de mia fiksita vojaĝvojo, kaj mi ankaŭ ne sciis, ĉu mi havus la necesan tempon. « Vi nepre devas veni, por vidi, kion ni faras », li insistis, « provu do, trovi kelkajn liberajn tagojn ». Kaj kun la realista komprenemo, kiun oni kelkfoje trovas tre simpatia en Ameriko, li aldonis : « Ni donos al vi ĉekon por la vojaĝelspezoj ».

Kaj mi trovis la tempon. Estis ankoraŭ ne la sesa matene, kiam la nigra Pullman-konduktoro venis al mia lito, por veki min : « Ni baldaŭ estos en St. Louis, sinjoro ». Sur la kajo mi trovis Pastron Macdonald S. J., kiu atendis min. Pastro Lord mem bedaŭrinde forestis en unu el siaj nenombreblaj vojaĝoj.

Ĉarma domo en la Pine-Boulevard gastigas la centron de la movado. Kvar pastroj (jesuitoj) kaj trideko da gejunuloj daŭre laboras tie. La monata gazeto « The Queen's Work » estas unu el la plej gravaj servoj. Ĝia eldonnombro nun estas 70.000 kaj ankoraŭ daŭre kreskas. Ĝi estas vigle redaktata, ornamata kun multaj bildoj, publikigas interesajn artikolojn, tiel ke la gejunuloj tre ŝatas sian gazeton. Sed eble ankoraŭ pli interesaj estas la broŝuroj. Pastro Lord sola verkis pli ol kvindek da ili. Ili estas verkitaj en tiel vigla, alloga kaj moderna maniero, ke gejunuloj avide legas ilin; eldonnombroj de 50.000 estas nenio eksterordinara. Sen enuigaj solenaj admonoj kaj sen dolĉaĉa bigoteco religiaj veroj kaj modernaj moralaj problemoj tie estas pritraktataj. Por disvastigi tiajn broŝurojn, oni fondis specialan organizaĵon, kiu nomiĝas « The Pamphlet-a-Month Guild »; ĉiu membro (nun ekzistas 10.000 membroj) promesas aĉeti kaj fordonaci almenaŭ unu broŝuron en ĉiu monato.

La aktiveco de Pastro Lord estas nekredeble varia. Li travetu ras la Unuigitajn Ŝtatojn de unu fino al la alia, faras paroladojn, predikas spiritajn ekzercojn, prezidas kongresojn, redaktas la gazeton, verkas librojn, broŝurojn, kantojn, kies muzikon li mem komponas, teatraĵojn, kiujn oni sukcese ludas ĉie, organizas la movadon... La Marianaj Kongregacioj estis en la epoko de ilia fondo (unua Sodalicio 1563 en Romo) potencaj helpiloj por la defendo kaj nova disvastigo de la kredo, ili ludis gravan rolon en la Eklezio. Ili povus kaj devus tion fari denove, tio estas la konvinko de Pastro Lord. La du celoj de la Kongregacio, persona sankteco kaj aktiva katolikeco, se ili estas ĝuste interpretataj, enhavas ĉion, kio estas necesa por junulara asocio. Reaktivigi la kongregaciojn dormantajn, plimodernigi ilin, fari el ili taŭgajn instrumentojn de la Katolika Agado, tio estas la tasko de la centro en St. Louis. Oni ĉiujare organizas krom diversaj regionaj kaj eparkiaj kongresoj Somerlernejojn por Katolika Agado, kiuj daŭras tutan semajnon. Tri tiaj somerlernejoj okazis en la jaro 1933, en tri strategiaj punktoj: por la Sudo en New Orleans, por la Centra Okcidento en Milwaukee, kaj por la Oriento en New York.

Ekzistas du specoj da kongregacioj : lernejaj kaj parohaj. Ĝis nun la unua speco (do por la studanta junularo) estas plej bone evoluigita. Specialaj agadoj estas organizataj por la katolika gazetaro, por la bona literaturo, por la elekto de la profesio.



Mi admiris la teknikan funkciadon de la sekretariejo. Ĉio estas aranĝita kun amerikana precizeco, efikeco kaj moderneco. Fine ĉiuj gesekretarioj kunvenis, kaj mi rakontis pri internaciaj taskoj de la katolika junularo kaj speciale pri MOKA. Mi havis profundan impreson pri la naskiĝanta granda movado de amerikana katolika junularo...

II.

Stratoj en amerikaj urboj estas longegaj. La aŭtomobilo, kiu kondukis min de unu fino de la Pine-Boulevard al la alia, portis min en novan mondon. Tie meze en la negra kvartalo leviĝas malbele aspektanta domego; ĝi enhavas la malriĉan preĝejon de Sankta Elisabeth, la parohejon, la lernejon, la salonon por la katolikaj unuiĝoj kaj la oficejon de revuo. Pastro Markoe tie akceptas min kun tutkora afableco. Ĉarma junulino, kies haŭto estas nigra kiel la forno je la muro, alportas la vespermanĝon, kaj poste ni sidiĝas en la laborĉambro de mia gastiganto, kiu portas kostumon multfoje flikitan kaj fumas la pipon. El la apuda salono oni aŭdas la bruon de kelkaj junuloj kaj junulinoj, kiuj ŝajnas prepari teatraĵon, kies enspezoj estas urĝe bezonataj por la paroho. Ni troviĝas meze en misia lando. Ho jes, la belega katedralo ne estas malproksima, kaj St. Louis posedas katolikan universitaton kaj aliajn bonegajn lernejojn. Sed ĉio tio estas por la blankuloj. Ĉi tie ni estas en alia mondo. Preskaŭ neniam okazas, ke blanka katoliko metas sian piedon en la preĝejon de Sankta Elisabeth. La du mondoj estas disigitaj per nekredeblaj abismoj de nescio, indiferenteco kaj antaŭjuĝoj. Ni estas en lando, kie ekzistas blankaj lernejoj kaj nigraj lernejoj, blankaj hospitaloj kaj nigraj hospitaloj, eĉ blankaj katolikaj preĝejoj kaj nigraj katolikaj preĝejoj. La gejunuloj en la apuda salono estas membroj de grupo, kiu nomiĝas « Young Catholic Crusaders » (« Junaj katolikaj krucmilitistoj »), preskaŭ ĉiuj el ili estas studentoj de ŝtataj duagradaj lernejoj. La katolika gazetaro ne ĉesas atentigi pri la grandaj danĝeroj de tiuj lernejoj, kiuj ofte kaŝas sub la masko de la « neŭtraleco » kontraŭreligiajn tendencojn. Sed la katolikaj lernejoj ne akceptas tiujn nigrajn samreligianojn kaj do devigas ilin, vizitadi la « danĝerajn » kaj « sendiajn » lernejojn, ĉar katolika duagrada lernejo por negroj ne ekzistas en St. Louis.

Nur se oni konas la seriozecon de la situacio, oni povas ĝuste taksi la agadon, kiun kelkaj katolikoj, pastroj kaj laikoj, blankuloj kaj nigruloj, entreprenis, laborante por la konvertado de la nigra raso al la katolikismo kaj por vera katolika frateco inter la rasoj. Antaŭ 70 jaroj inter 4 ½ milionoj da usonaj negroj estis 200.000 katolikoj, hodiaŭ la katolikoj estas 250.000 inter 13 milionoj. Kial tiu malprogreso? Ĉar rilate al siaj nigraj fratoj la blankaj katolikoj ne estis sufiĉe katolikaj, respondas Pastro Markoe.

Pastro Markoe rakontas al mi el sia vivo. Li estis dum kelkaj jaroj misiisto inter la indianoj, poste li dediĉis sian tutan vivon al la nigra raso, kiun li amas kaj temperamente defendas kaj el kiu li jam multajn homojn gajnis por la vera Eklezio. Li publikigas bonegan monatan revuon *Interracial Review* (Interrasa Revuo) kaj estas unu el la plej aktivaj pioniroj de la Nacia Katolika Interrasa Asocio. « Mi dankas Dion, ke li starigis min ĉi tien. Mi ne povus sidi en iu trankvila loko, por fari mian pastran servon. Mi devas povi laboregi kaj batali. Ĉi tie la mizero kaj senlaboreco inter la negroj estas terura. Sed mi dezirus, ke vi povus vidi, kiel ili helpas unu la alian, kiel familioj, kiuj mem preskaŭ havas nenion, akceptas eĉ si alian familion senlaboran. En nia agado ni havas nenian helpon de ekstere. Mi mem ricevas miajn vestojn kaj mian tabakon de mia Ordeno, sed ĉion alian niaj negroj donacas al ni, aŭ ni almozpetas ĝin en plej diversaj formoj. Ili ĉiam faras, kiom ili povas. »

Pastro Markoe ankaŭ organizis Katolikan Interrasan Horon ĉiusemajnan en radio, kaj la saman aferon faris en New York la Cardinal-Gibbons-Instituto. Bonegaj parolantoj tie parolas pri la negra problemo, pri la katolika doktrino pri la rasoj, la edukado ktp. La paroladoj kaj bone elektita muziko komprenigas kaj amigas iliajn nigrajn samlandanojn al la blankaj amerikanoj kaj precipe al

la katolikoj. Kaj ankaŭ multaj negroj aŭskultas kaj perdas iom el sia nescio kaj s'aj antaŭjuĝoj kontraŭ la Eklezio, kies veran naturon kaj belecon ili ne konas. La ĵurnaloj parolas simpatie pri la radio-disaŭdigoj, kaj gratulleteroj alvenas de ĉie, de Kanado ĝis Alabama...

Estis noktmezo, kiam mi adiaŭis Pastron Markoe, por ankoraŭ atingi la vagonaron, kiu devis konduki min 1000 kilometrojn orienten...

Wilhelm SOLZBACHER.

---

# Jesuo en Ĥina malliberejo.

Niaj malnovaj gelegantoj konas bone la nomon de Pastro Lebbe (Vincent Lei-Ming-Yuan), apostolo de la ĥina junularo. Depost sep jaroj li denove estas en Ĥinujo kaj tie li fondis novan religian kongregacion : « Fratetoj de Sankta Johano Baptista ». La jenan artikolon (iom mallongigitan) ni tradukas el « Jeunesse Chinoise », bulteno de la ĥina katolika junularo.

Ĉu Kristo vizitas niajn ĥinajn malliberejojn? Ho jes, kaj pri tio mi nun volas rakonti.

Antaŭ kelkaj jaroj admirinda kristano, Tcheou Kong Ting, vicprezidanto de la Katolika Agado en Shanghai, kiu estis iam mandareno de la malliberejoj, decidis dediĉi sin tute al la apostolado de la malliberuloj. Li bonege sukcesis, sed poste oni vokis lin al Peiping por tie gvidi unu el la plej grandaj (nekatolikaj) hospitaloj. Tamen li daŭrigis en la nordo sian laboron por la malliberejoj. Bedaŭrinde li subite mortis, sed la movado de li iniciatita neniam mortos.

Kiam li restadis en la Nordo, iam Pastro Lebbe interkonsentis kun li pri renkontiĝo en Paotingfou, kie ili volis komune klopodi trovi aliron al la malliberejoj en la regiono de la Apostola Vikariejo An-Kwo. Lasu min unue rakonti aventuron, kiun Pastro Lebbe travivis en sia vojaĝo.

Pastro Lebbe vojaĝis bicikle al Paotingfou, kun la sekretario de la Katolika Agado, Tchan Ti Hua. Pro la malbona stato de la vojoj post longa pluvado ili povis nur tre malfacile antaŭeniri. Fine nokto surprizis ilin, nokto malluma sen steloj kaj sen luno. Ili estis ankoraŭ 20 liojn (12 kilometrojn) sude de Paoting kaj 5 liojn (3 kilometrojn) sude de Peitajan, kiam subite malmola voĉo kriis : Haltu! Haltu! Niaj du vojaĝantoj, pene moviĝantaj en la koto, en kiu iliaj piedoj dronis, kaj portantaj siajn biciklojn sur la ŝultroj, do haltis. Pastro Lebbe ŝajnis tute ne malĝoja pri sia konatiĝo kun la mondo de la malgrandaj banditoj, kiujn li ankoraŭ neniam renkontis kaj pri kiuj oni tiom rakontis al li. La rabistoj ordonis al siaj du kaptitoj veni kun ili, kaj, kiam ĉi tiuj iris tro malrapide, la sono de ilia voĉo fariĝis tre malĝentila. « Estu trankvilaj! », diris Pastro Lebbe, « ni venas, ni ja estas kamaradoj, restu trankvilaj, vi baldaŭ vidos, ke ni bone interkompreniĝos. » Kaj pastro Lebbe komencis fari al la rabistoj malgrandan paroladon. « Vi ne devas fari al mi malfacilaĵojn, ĉar mi iras al Paoting por labori por viaj fratoj en la malliberejoj. »

— « Kiu do vi estas? » — Pastro Lebbe elokvente kaj ĝentile rakontis al ili pri sia laboro kaj — la du rabistoj malsuprenturnis siajn pafilojn kaj lasis siajn kaptitojn libere foriri...

Pastro Lebbe renkontis do Sinjoron Tcheou en Paoting kaj vizitis kun li la mandarenon, kiu estas direktoro de la pundistrikto, al kiu apartenas kun unu sola escepto ĉiuj malliberejoj en la Apostola Vikariejo An-Kwo. Li estis afable akceptataj, kaj la direktoro volonte donis la permeson, ĉar ja la intencitaj vizitoj, sen iuj kostoj, povis esti nur bonaj por la malliberuloj. Li sendis rekomendleteron al ĉiuj estroj de malliberejoj, ke Pastro Lebbe kaj liaj helpantoj povu libere fari siajn agojn de mizerikordo. Do subite ĉiuj malliberejaj pordoj malfermiĝis al ni, kaj ni nun havis la taskon, eluzi la okazon.



Kune kun siaj « Fratetoj de Sankta Johano Baptista » Pastro Lebbe komencis la vizitadon. Granda estis la mirado de la malliberuloj : Kion do tiuj viroj intencis fari? Sed la surprizon baldaŭ sekvis la simpatio kaj la simpation sekvis la amo al tiuj, kiuj venis en la malliberejon sole por la materia kaj spirita bono de la kaptitoj. Ĉar kompreneble baldaŭ ankaŭ la religia problemo montriĝis kaj multaj deziris fariĝi kateĥumenoj. Kiam la protestantoj vidis tion, ili ankaŭ volis iri. Ricevinte la necesan permeson, ili komencis la vizitadon de la malliberejoj. La Savarmeo faris tion dum tri monatoj, la anglikanoj dum unu monato. Poste neniu plu venis, kaj la katolikaj Fratoj solaj restis sur la loko. Pastro Lebbe mem ĉiam, kiam liaj multegaj aliaj laboroj tion permesis, venis ankaŭ, je la grandega ĝojo de la malliberuloj, kiuj tre ŝatis kaj admiris lin. Pastro Lebbe diris al mi, ke tio, kio plej multe impresis lin, estis la sincera simpleco kaj la bela konkordo inter la malliberuloj. Li en tio rememoris la vortojn, kiujn Beata Clet (franca pastro mortinta en Ĥinujo kiel martiro) skribis el sia malliberejo al Francujo : « Mi dezirus, ke la direktoroj de niaj francaj malliberejoj venu al Ĥinujo por vidi, kiel ĉio funkcias bone ĉi tie. » Ĉu Clet estis estinta en franca malliberejo dum la Revolucio, mi ne scias, sed kia bela penso de misiisto, kiu estus povinta skribi iom draman leteron pri sia malliberigo, kaj kiu simple diris : « Venu por vidi, kiel bone oni fartas en niaj ĥinaj malliberejoj ».

La apostolado de Pastro Lebbe kaj de la Fratoj estis sukcesa, kaj kelkajn monatojn post la unua vizito okazis la unuaj baptoj, kiujn Pastro Lebbe mem donis, kaj en la malluman malliberejon malsupreniris je la unua fojo Jesuo Kristo, ĉar Pastro Lebbe celebris la sanktan meson.

La agado de la Fratoj ĉesis eĉ ne unu tagon, kaj jen sub la ombro de la acero, kiu estas la sola arbo en la korto de la malliberejo, la katehumenoj, plejparte malriĉaj analfabetoj, ripetis senĉese preĝojn kaj la demandojn de la katekismo. Iutage, kiam Pastro Lebbe forestis kaj mia parohestro, Pastro Fan, estis malsana, la Frato, kiu okupiĝis pri la malliberuloj, vokis min kaj diris : « Patro, pli ol 20 katehumenoj petas la bapton. Venu ekzameni ilin! » Tiuj mi sekvis la Fraton al la malliberejo. Preteririnte la du pordojn kun la multaj seruroj, mi eniris la korton kaj tuj estis ĉirkaŭata de malliberuloj, kiuj kiel ĉiam ĝoje akceptis min. Rondo formiĝis ĉirkaŭ la fama acero, kaj la demandoj komenciĝis per la unua demando de la katekismo : « Ni wei ĉen mo kin Kiao? » Kial vi volas fariĝi kristano? Ĉiuj, ridetante, respondas sufiĉe bone, 12 povos ĉi tiun fojon ricevi la bapton, ses pli ol la lastan fojon; jen bela rezulto por la Fratoj.

La postan dimanĉon, la 10 septembro 1933, je la kvina kaj duono de la mateno, mi iris kun tri Fratoj al la malliberejo, kie okazos sankta meso kiel la unuan fojon. La sola tablo, sur kiu ili ĉiam preparas sian nutraĵon sub la acero, estis transformita en altaron, antaŭ kiu la 12 baptotoj surgenuis. Jen denove la ĉiam belaj ceremonioj de la bapto. « Eliru el li, malpura spirito kaj lasu lokon al la Sankta Spirito! », kaj fine la transdono de la blanka vesto kun la vortoj : « Ricevu ĉi tiun blankan veston kaj reportu ĝin senmakula al la tribunalo de Jesuo Kristo! »

Tiel 12 homoj fariĝis kristanoj en tiu malgranda kaj mizera malliberejo, la aliaj, kiuj jam estis baptitaj la unuan fojon, konfesis unuafoje kaj poste ricevis sian unuan sanktan komunion. La meso komenciĝis, kaj en la prediko mi klarigis la evangelion de la tago : Vi ne povas servi du majstrojn! Vi ne povas servi Dion kaj Mamonon — Fine la neforgesebla momento, kiam Jesuo malsuprenvenis en la malliberejon. Li vizitadu ĝin ankoraŭ ofte...

Raymond LEI.

# AD LUCEM.



*Katolikaj studtagoj por la frata unueco inter la rasoj en Reims.*

14 landoj el ĉiuj kvin kontinentoj, blankaj, flavaj kaj nigraj rasoj, estas reprezentitaj sur ĉi tiu bildo, kiu ilustras la raporton, kiun ni publikigis en la novembra numero. En la antaŭa vico sidas meze Mgr. Vaneufville (Roma) kaj D-ro Zacharias (Lille). Nia redaktoro (kun malfermita kolumo) staras dekstre en la dua vico (inter benediktana pastro kaj anamano).

Post la kunveno juna negro, profesoro en usona universitato, skribis i. a. : «... Cetere, ĉu la asocio AD LUCEM per la spirito, kiu ĝin karakterizas, ne estas la lasta savplanko, kiun la koloraj popoloj ne plu kuraĝis atendi flanke de la blankuloj, eĉ de la katolikoj? Se AD LUCEM ne ekzistus, oni devus krei ĝin, por ke la indiĝenoj fine komprenu kelkajn aferojn, kiuj faras ilin konfuzaj kaj hezitemaj rilate al la katolikismo kaj por ke en iliaj okuloj la Roma Eklezio montru sian veran karakteron. Tio estas la kaŭzoj de nia entuziasmo por AD LUCEM, ni, kiuj estas aŭ estis edukataj en viaj lernejoj kaj kiuj tial suferis pro la duona malsimpatio, en kiun certaj mankoj, cetere tre homaj, metis nian belan religion en niaj landoj. Tiuj nuboj povos disiĝi iom post iom, kaj nova homaro, kia ĝi estus devinta ekzisti de ĉiam, povos vivi en paca harmonio, por servi kaj laŭdi sian Kreinton... »

Kaj jen estas kelkaj frazoj el la letero, kiun la Papa Kongregacio de la Propagando en Romo sendis al Kardinalo Liénart, prezidanto de AD LUCEM : « ... **Mi certigas al Via Kardinala Moŝto la simpation kaj bonvolon de la Propagando rilate la junan asocion, kies seriozaj kulturaj iniciatoj multe helpos la reciprokan konatiĝon inter studentoj kaj universitatanoj eŭropaj kaj orientaj... La Propaganda Kongregacio estas vere dankema al vi pro la patra zorgo, kun kiu vi bonvolas gvidi la unuajn paŝojn de la asocio, speciale per la fondo de instituto por la doktrina, morala kaj spirita eduko de la membroj. Sendube sub la direkto de Via Kardinala Moŝto tiu Instituto havos tre klaran karakteron, por povi doni al la misioj laikojn specialigitajn en sia profesia kulturo kaj al la hierarkio valoregajn helpantojn por ĉiuj formoj de la Katolika Agado.** »

En Lille la Instituto de AD LUCEM estas solene inaŭgurita la 21 decembro 1933 per Kardinalo Liénart. Nun ĉ. 15 gestudentoj tie loĝas kaj kunlaboras, inter ili unu ĥino, unu japano kaj unu siamano. La domo estas granda kaj bela (18-20, Rue de Toul), ĝi havas ĉarman kapelon kiel centran punkton — kaj la spirito estas apostola kaj aktiva. Dio benu la movadon por la frata unueco inter la rasoj !

NI BEZONAS monon ! Varbu novajn abonantojn !



# Internacia Junulara Agado.

*Katolika Junularo.*

*La Ibero-Amerikana Konfederacio de Katolikaj Studentoj estas fondita.* La kongreso, kiu unue estus devinta okazi en Lima (Peruo), okazis kun bona sukceso en Romo. Malgraŭ la granda distanco venis 3 delegitoj el Ĉilio, 8 el Kolombio, 1 el Ekvatoro, 3 el Hispanujo, 9 el Meksiko, 1 el Portoriko, 3 el Urugvajo kaj 3 el Venezuelo. Krome ĉeestis diversaj parolantoj kaj gastoj el Romo kaj el eŭropaj landoj, inter ili la ĉefsekretario kaj la administra sekretario de Pax Romana. Unue oni festis komune la feston de Nia Sinjorino de Guadelupe, patronino de Latinameriko. 14-28 decembro okazis la kongreso. La malferman kunvenon prezidis Mgr. Fr. Orozco y Jimenez, ĉefepiskopo de Guadalajara (Meksiko). Kvar fakaj komitatoj studis la edukajn, socialajn, religiajn kaj organizajn problemojn. Fine la Konfederacio fondiĝis. Ĝi anstataŭos la ĝisnunan « Sekretariejon », kies provizora sidejo estis en Meksiko. Patrono estas Sankta Ignacio de Loyola. Jam 17 asocioj estas aliĝintaj. La Konfederacio aliĝis al Pax Romana. La kongreso okazos en ĉiu dua jaro, la sekvonta estos en Montevideo (1936). Prezidanto de C. I. D. E. C. fariĝis M. Garretón Walker (Ĉilio), la Direktanta Konsilantaro havos sian sidejon en Meksiko. Krome ekzistas specialaj komitatoj, kies direktado estas donita al diversaj asocioj. Ekz. pri la socialaj problemoj okupiĝos Peruo, pri filozofio kaj metodologio Argentino, pri edukado Meksiko, pri ibero-amerikana kulturo Hispanujo, pri historio Venezuelo, pri literaturo kaj arto Kolombio, pri la gazetara servo Meksiko kaj pri publikigado de broŝuroj Hispanujo. La delegitoj estis afable ricevataj de la Sankta Patro. En sia vojaĝo hejmen ili vizitis la ĉefajn universitatajn urbojn de Eŭropo.

*Pax Romana* havis kunsidon de sia konsilantaro en Fribourg. Ĝi nun preparas grandan pilgrimon (kun kelkaj laborkunsidoj) al Romo, 29 marto-5 aprilo 1934. La Internacia Sociala Semajno okazos en Budapest, 15-20 aŭgusto 1934, en Svisujo oni faros unuan provon de internacia katolika labortendaro.

*Internaciaj Tagoj por Katolikaj Studentinoj* okazis 4-6 januaro 1934 en Paris, studentinoj el Anglujo, Armenujo, Aŭstrujo, Belgujo, Brazilio, Francujo, Germanujo, Hungarujo, Luksemburgo kaj Svisujo partoprenis. La temo estis : Kiel povas studentina asocio helpi por formadi la personecon de la studentino?

*Internacia Katolika Universitata Agentejo,* fondita de SIPUC (Lille), nun regule dissendas dusemajnan kaj semajnan servon franclingvan kun informoj pri la katolika studenta vivo en ĉiuj landoj.

*AD LUCEM,* kiu ja nun havas en Lille sian propran hejmon bone funkciantan, organizis en la karnavalaj tagoj (12-13 februaro 1934) Interrasan Renkontiĝon en Paris, por helpi interamikiĝi studentojn de diversaj rasoj. Krom la gravaj diskutoj oni ankaŭ ne forgesis la kantadon kaj la muzikon kaj la — manĝojn. Anamaj kaj malgaŝaj manĝoj sendube plifaciligis al la eŭropanoj la bonan komprenon de Hindoĥinujo kaj Madagaskaro...

*La Internacia Katolika Virina Ligo kaj ĝia Junulara Sekcio* havos sian 9-an kongreson en Romo, 26 marto-7 Aprilo 1934.

*Internacia konkurso por la junularo.*

« *Kristo kaj la Universala Frateco* ». La Junulara Komisiono de la Tutmonda Ligo por Internacia Amikeco per la Eklezioj kaj de la Universala Konsilantaro por Kristana Vivo kaj Laboro petas nin, publikigi sciigon pri internacia konkurso. La organizajo estas protestanta, tamen certe ankaŭ tekstoj verkitaj de katolikoj kaj el katolika spirito estus bonvenaj. Estas rimarkinde, ke la grava organizajo skribis al ni en Esperanto kaj sur leterfolio kun Esperanto en la kapo. Jen do la sciigo :

« Dank' al la bonvolo de amerika kristanino, amikino de la paco S-ino Van Loan de Babylon (Usono), estas kreita fondajo, kiu aranĝas konkurson kun la temo : « Kristo kaj la Universala Frateco ». Gia celo estas helpi al la plivastigo de la paca spirito de internacia amikeco inter la junularo.

La konkurson organizas la Junulara Komisiono (fako de la « Universal Christian Council for Life and Work » kaj la « World Alliance for Promoting Friendship through the Churches »).

Rajtas partopreni gejunuloj loĝantaj en Eŭropo kaj naskitaj post la 30 aprilo 1914 kaj antaŭ la 1 majo 1920. Teksto en kiu ajn lingvo. La Juĝantaro (el diversaj nacioj kaj eklezioj) disdonos pli ol 150 premiojn, el kiuj :

unua 300 usonaj dolaroj,
dua 200 usonaj dolaroj, k. t. pl.

Detalaj informoj estas ricevеblaj senpage pere de la Sekretariejo de la Junulara Komisiono : Case-Postale nº 46, Eaux-Vives, Genève (Svisujo). Bonvolu diri, se oni deziras ilin en Esperanto, franca, angla aŭ germana lingvoj. »

*Junularaj renkontoj ĉiuspecaj...*

*Franca-germana konferenco* de junulargvidantoj okazis por daŭrigi la antaŭajn kunvenojn (pri kiuj J. B. raportis), en Berlin, ĉi tiun fojon laŭ speciala invito de la germana Reichsjugendführer. La francan delegitaron gvidis B. de Jouvenel, filo de la konata (maldekstra) politikisto. La germanaj partoprenantoj ĉiuj estis nacisocialistoj.

*Kongreso de Orientaj Studentoj en Romo.* 600 studentoj afganaj, arabaj, egiptaj, hindaj, ĥinaj, japanaj, persaj kaj siamaj, kiuj studas en diversaj eŭropaj landoj, venis en decembro 1933 al Romo, por tie kongresi. Poste ili faris viziton al la Sankta Patro kaj al Mussolini. La Sankta Patro speciale ĝojis, ke ili vizitis la kolegion de la Propagando, kiu ja, kiel li diris, « estas ankaŭ iomete ilia domo ».

*Azia Junulara Kongreso.* En Tokio kunvenis 16-19 decembro 1933 2.000 junuloj por « postuli la rajtojn de la junaj azianoj je Azio, la glora lulilo de la homaro ». El Hindujo kaj Afganistano, el Mongolujo kaj Manĉurujo, Birmanio kaj Persujo, Turkujo kaj Siamo, Ĥinujo kaj Japanujo ili estis venintaj. Kelkaj japanaj ministroj partoprenis la malferman kunvenon.

**Studenta Junularo.**

*La Internacia Studenta Servo* okazigis studkonferencon en Oxford (Anglujo) pri ĥinaj problemoj. Ĥinaj kaj eŭropaj studentoj el Anglujo, Belgujo, Francujo Germanujo, Nederlando kaj Skotujo interese diskutis pri kulturo kaj edukado en Ĥinujo kaj la internaciaj problemoj koncernantaj tiun landon. Alia konferenco okazis en Ettal (vidu supre), kaj, ĉar multaj studentoj ne povis aŭ ne volis partopreni en tia konferenco en Germanujo, ĝia daŭrigo okazis en Luziensteig (Svisujo). Oni speciale diskutis praktikan helplaboron por studentoj, ekz. por tiuj, kiuj ne povas daŭrigi siajn studojn en Germanujo pro politikaj aŭ rasaj kaŭzoj aŭ pro pacifista agado. Estas interese, ke 22 hindaj studentoj kaj profesoroj, por kiuj la I. S. S. estis organizinta dumonatan vojaĝon tra 5 eŭropaj landoj, partoprenis en la konferenco.

**Protestanta Junularo.**

*La Kristanaj Unuiĝoj de Junaj Viroj* (YMCA) havis konferencon por Centra Eŭropo en Wildhaus (Svisujo). 11-15 septembro 1933. Aŭstraj, ĉeĥoslovakaj, germanaj, hungaraj kaj svisaj junuloj diskutis pri la kristana sinteno en la profundaj politikaj ŝanĝoj okazintaj en Eŭropo. — Internacia Knaba Tendaro por la Ekstrema Oriento okazis en la Filipinaj Insuloj. Ĉeestis 12 knaboj el Usono kaj Havajo, 12 el Ĥinujo, 10 el Japanujo, 15 el la Filipinaj Insuloj, 10 el Siamo, krome kelkaj rusoj (el Manĉurio), koreanoj kaj javanoj. En la Filipinaj Insuloj okazis ankaŭ konferenco por la agado de la movado en la Ekstrema Oriento, prezidis D-ro S. K. Datta (Hindujo).



*La Mondfederacio de Kristanaj Studentoj* kunvenigis 93 delegitojn el 16 landoj en Coppet (Svisujo) 3-9 aŭgusto 1933. Komunismo, Naciismo kaj Raso estis la ĉefaj temoj.

*La 34-a Internacia Kongreso por Kristana Penado* (Christian Endeavour) okazis 8-13 julio 1933 en Milwaukee (Usono) kun delegitoj el Ameriko, Eŭropo kaj Azio. La granda Mondkongreso de tiu protestanta junulara movado okazos en aŭgusto 1934 en Budapest (Hungarujo).

**Socialista Junularo.**

*La Socialista Junulara Internacio* havas nun sian sekretariejon en Praha (Ĉeĥoslovakujo). La Ekzekutiva Komitato kunsidis en Paris 26-27 aŭgusto 1933. La raporto de la sekretariejo montris progresojn en kelkaj landoj, precipe en la balkanaj regionoj kaj en Svedujo, kie la Socialista Junulara Asocio kun 80.000 membroj nun estas la plej granda en la Internacio. La Ekzekutivo decidis, prepari specialan eldonon hispanlingvan de la Internacia Bulteno, organizi la trian Internacian Socialistan Junularan Kunvenegon en Liége (Belgujo) en aprilo 1934 kaj akcepti en la Internacion la socialistajn junularajn asociojn de Grekujo kaj Hungarujo.

*La Internacia Federacio de Socialistaj Studentoj* havis kunsidon de sia ekzekutiva komitato en Wien. En rezolucio koncerne komunan fronton de la proletariaro oni urĝe postulas, ke interkompreniĝo kaj kunlaboro inter la Dua kaj la Tria Internacioj estu atingata kiel eble plej baldaŭ. En la rondoj de socialistaj studentoj la kondiĉoj por komuna socialista agado kontraŭ la faŝismo kaj por kunlaboro kun aliaj klasbatalaj grupoj devus tuj realiĝi.

**Komunista Junularo.**

*La Internacia Junulara Tago*, kiun la Komunista Junulara Internacio organizas ĉiujare en la unua dimanĉo de septembro, okazis ankaŭ 1933 en la diversaj landoj. En Moskva okazis sur la Ruĝa Placo antaŭ la Maŭzoleo de Lenin granda parado. Fiere la bolŝevista gazetaro raportas, ke « malantaŭ la sportuloj marŝis la rangoj de la armita laborista junularo ». — La Komunista Junulara Asocio de Germanujo, kiu nun neleĝe laboras, havis komence de aŭgusto sekretan kunvenon de sia Centra Komitato en Bayereuth. Ni sukcesis havigi al ni iom da materialo pri la kunveno kaj publikigas, por doni al niaj legantoj impreson pri la afero, kelkajn frazojn el la alvoko akceptita de la kunveno. Interese estas, ke oni speciale alvokas ankaŭ la katolikan junularon. « Laboranta junularo, socialdemokrataj, katolikaj junlaboristoj! La malsatdiktaturo de Weimar (!) estis por la laborista junularo de Germanujo pundomo, ĝia malbeninda plenumpolitiko laŭ Versailles mokrido pri la naciaj (!) sentoj de ĉiuj laboristoj. Milionoj da gejunuloj vidis en la faŝistaj promesoj de la laborservo forkuron el la doloro de la senlaboreco, milionoj da junuloj vidis en la milita sporto de la Tria Regno liberigon el sociala kaj nacia sklaveco... Socialdemokrataj kaj kristanaj junlaboristoj, prenu la fratan manon, kiun ni tendas al vi... Ni volas la revolucion por nia estonteco. Ni volas la laboristan kaj kamparanan respublikon, por malhelpi novan imperialistan popolbuĉadon por la profito de la kanonreĝoj... »

**Pacifista Junularo.**

*Internacia Konferenco de radikale-pacifista junularo* okazis 3-5 aŭgusto en St. Mandé apud Paris, organizite de la Junulara Sekretariejo de la Internacio de Militkontraŭuloj. Delegitoj el 10 landoj, precipe Britujo, Francujo, Germanujo kaj Usono, partoprenis. Harold F. Bing (Anglujo), la konata pacifista junulargvidanto, kaj Lefer (Francujo) prezidis. Sekvante la raporton de Bernhard K. Nielsen (Danujo) pri la antaŭlaboroj, en kiu la konsento de pli ol 20 junularaj asocioj estis sciigata, kelkaj delegitoj raportis pri la paca movado de la junularo en siaj landoj. Unu delegito parolis pri la subpremo de la paca movado en Germanujo. La konferenco akceptis laŭ propono de Robert Bénardeau (Francujo) rezolucion kontraŭ la milita eduko de la junularo en la lernejoj kaj por la forigo de la deviga militservo. Ĝi reakceptis la principojn akceptitajn en la lastjara kongreso en Danujo, laŭ kiuj fundamenta ŝanĝo de la kapitalista socia ordo estu akcelata per senperforta maniero. Franz Rona (Aŭstrujo) paroladis pri « Internacia kunlaboro de la junularo », sekvis vigla diskutado. La konferenco akceptis rezolucion por Esperanto. La laboron de la konferenco daŭrigas kaj ĉiujn informojn donas la junularaj sekretariejoj (Wien IX., Galileigasse, 8, kaj Paris, 77, rue des Saints-Pères).

*Junulara Paca Tendaro* okazis post la konferenco en Chevreuse. preskaŭ 20 landoj estis reprezentitaj. La programo enhavis 3 paroladojn kun diskutado, tendarfajrojn, Esperanto-kurson de kamarado Antoine el Lyon kaj diversajn ekskursojn.

*Internaciaj libertempotendaroj* okazis en Anglujo, en Boulogne-sur-mer kaj en Thonon apud la Lago de Genève (la tendaro de Thonon nur por junulinoj). La Internacia Amikeca Ligo, la franca asocio « La Paix par le Droit », la Mondpaca Ligo de Patrinoj kaj Edukistinoj kaj similaj organizaĵoj kunlaboris. Denove multaj gejunuloj konatiĝis kun junularo el aliaj landoj, kaj forta amikeco kaj solidareco ekĝermis.

*En Barèges* (Francujo) la libertempotendaro de la franca J. E. C. (Katolika Studenta Junularo) fariĝas pli kaj pli internacia, en la lasta jaro i. a. la germana MOKA-sekretario ĉeestis. Ni publikigis pri la tendaro specialan artikolon de nia amiko Nouat.

# Nia Movado.

*Anglujo.*

En januaro la internacia MOKA-sekretario estis kelkajn semajnojn en London kaj Centra Anglujo. Li vizitis diversajn amikojn kaj katolikajn gvidantojn.

*Aŭstrujo.*

*Wien.* En Kruciligo nova Esperanto-kurso por komencantoj, 15 gepartoprenantoj (plejparte junulinoj el katolika knabina ligo), daŭras la ekzerc- kaj laborkunvenoj por progresintoj. — Nova kurso por komencantoj en Wien XVI., « Siedlung Starchant », gvid. W. Mudrak, 20 gepartoprenantoj, ĉefe gejunuloj, ankaŭ partoprenas Pastro Franke, rektoro de tiea preĝejo.

*Katolika Unuiĝo Esperantista* (KUE) en Wien. En Kristnaskofesto parolado de Pastro J. Retzmann, deklamoj de gesamideanoj Gasperini, Siedl, Berndl, mallonga parolĥoro « Kristnaskovoko » de W. Mudrak.

« *Kunlaboro* », simbola ludo de W. Mudrak, kiun publikigis LA JUNA BATALANTO, estis prezentata en la Zamenhof-festo de la neŭtrala Viena Esperanto-Unuiĝo kaj eĉ en la Zamenhof-festo de la socialista Aŭstra Laborista Ligo Esperantista.

*Artikoloj* de nia nacia sekretario Water Mudrak pri Esperanto kun atentigo pri MOKA kaj LA JUNA BATALANTO aperis en « Neue Zeitung » (Wien), kaj « Steyrer Zeitung » (Steyr). Ilustrita gazeto « Weltguck » represis el LA JUNA BATALANTO (kun indiko de la fonto) artikolon « Inter la Mohawk-Indianoj ».

*Belgujo.*

En februaro nia internacia sekretario partoprenis en la Internacia Kongreso por la Defendo de la Paco en Bruxelles. Li tiuokaze vizitis la sekretariejojn de katolikaj junularaj asocioj.

*Francujo.*

*Dunkerque.* Nia internacia sekretario estis gasto de nia amiko Houzé kaj faris paroladon (pri Ameriko) en la (neŭtrala) Esperanto-grupo.

*Lille.* D-ro Solzbacher vizitis la tiean hejmon de AD LUCEM, la SIPUC (Internacian Sekretariejon de la Katolika Universitata Gazetaro) kaj nian iaman ĥinan MOKA-sekretarion Pastron Kao O. F. M., kiu nun studas en la katolika universitato de Lille. Li nun estas regula kunlaboranto de SIPUC kaj havas la taskon, traduki laŭeble materialon kaj gazetojn en Esperanto ricevitan. D-ro Solzbacher promesis kunlaboron de MOKA por nova franclingva monata gazeto kun internaciema tendenco.

*Ĥinujo.*

Pastro Kao, nia estinta MOKA-sekretario, ricevis bonajn novaĵojn el diversaj partoj de la lando. Niaj MOKA-anoj Pastro Aloizio Ly kaj Pastro Tadeo Wang nun estas en la Katolika Universitato de Peiping (Fu Yen) kaj volas tie komenci propagandon por nia movado. — Ankaŭ en Tung-Yuen-Fang ankoraŭ fervore agadas niaj amikoj. — Ĝojigan leteron de nia nova nacia sekretario Pastro Paŭlo Ch'ang ni jam publikigis en la lasta numero. Ni ricevis novan interesan leteron de li.